


DULINGVA KAJ MULTLINGVA EDUKADO
INTERNACIA KONFERENCO DE EŬROPA
ESPERANTO-UNIO
BRUSELO, la 10-an de DECEMBRO 2008



MALNETO DE KOMUNIKAĴO

Konsiderante ke:

- a) la konferenco okazis la 10-an de decembro 2008, kiel la kontribuo de EEU al la festado de la 60a datreveno de la Universala Deklaro pri Homaj Rajtoj de UN;
- b) 2009 estis proklamita la Eŭropa Jaro de Kreemo kaj Novigo;
- c) la uzado de mallongaj lingvo-orientigaj kursoj por levi lingvokonscion kaj plibonigi la lingvolernadon, estas kaj kreemaj kaj novigaj;

La konferenco konsentis ke:

1. Du- aŭ plurlingva edukado por infanoj havas multajn pozitivajn aspektojn, ĉar ili akiras valorajn interkulturajn sciojn antaŭ kaj dum la lerneja aĝo. Koscie-antaŭenigita familia dulingveco emas pligrandigi la kvanton de tempo kiun ĉiu el la gepatroj pasigas en interagado kun siaj infanoj, unue cele al plibonigo de ilia lingvolernado, sed poste tiu interagado emas pliprofundigi la komprenon de la kulturo de la popolo kies lingvo ĝi estas.
2. Nepras la uzo de la lernata lingvo por reala komunikado por ke ĝi estu vere lernita. Ekzemple, oni povas instrui unu aŭ pli da aliaj studobjektoj per ĝi, aŭ oni povas uzi la lernatan lingvon en la administrado de la lernejo, en komunikado inter instruistoj kaj studentoj, ktp.
3. Tamen gravas certigi ke la gepatra lingvo de infano estu jam bone fiksita antaŭ ol uzi duan lingvon por instrui aliajn studobjektojn.
4. Kaze de migrantoj, la du- aŭ plurlingva edukado ne emas efiki negative al infano se oni edukas laŭ elektita sistemo konsekvence, kun la subteno de la ĉirkaŭa socio.
5. La konferenco montris grandan intereson en la koncepto de “persona adoptita lingvo” kiel proponita en la Raporto Maalouf, “Un Défi Salulaire: comment la multiplicité des langues pourrait consolider l’Europe”,
http://ec.europa.eu/education/languages/archive/doc/maalouf/report_fr.pdf
6. Multaj partoprenantoj substrekis la gravecon de la propedeŭtika, aŭ lernfaciliga, aliro al lingvolernado, t.e. la uzo de mallongaj (50-100 horoj) kursoj en pli regulaj lingvoj cele al pligrandigo de la memfido, kaj sekve de la lernemo, de la lernantoj; kaj al antaŭenigado de plurlingveco en pli vastaj tavoloj de la loĝantaro.

REKOMENDOJ

1. La konferenco konsideris la aliron de la »Springboard« projekto en Britio (www.springboard2languages.org), t.e. la uzon de "lingvo-orientiga kurso" baze de la gramatiko de Esperanto kun limigita vortaro de la plej ofte uzataj morfemoj, estas ekzemplo de »aparte bona praktiko« en la lingvolernado, kaj do aparte interesa kaj studinda. La konferenco rekomendas ke la Eŭropa Komisiono komisiu detalan studon de la projekto, aparte pri ties potencialo plibonigi la lingvolernado en aliaj Membroŝtatoj de EU. Ĝi ankaŭ rekomendas al la Komitato pri Edukado kaj Kulturo de la Eŭropa Parlamento organizi studon pri la efektivebleco je pli vasta skalo de la projekto »Springboard«.
2. La konferenco rekomendas ke la Eŭropa Komisiono kuraĝigu la EU-Membroŝtatojn konsenti pri sistemo por ebligi al lernejoj loĝantaj en alia Membroŝtato studi la gepatran lingvon en sia hejmlando dum almenaŭ unu monato jare. Lernejoj devus montri reciprokan flekseblecon kaj donante forpermeson dum monato kaj akceptante lernejanon de aliaj Membroŝtatoj dum unu monato.

Profesoro David Marsh, Universitato de Jyväskylä, Finnlando

Profesoro Wim Jansen, Universitato de Amsterdamo, Nederlando

Dr-ino Katalin Kováts, gvidantino de la projekto "Edukado.net", Nederlando

Angela Tellier, gvidantino de la projekto "Springboard", Britio

Kristin Tytgat, Erasmushogeschool Bruselo, Belgio

Zlatko Tišljar, Slovena Instituto pri Edukado de Plenkreskuloj en Maribor, Slovenio

Marc Demonty, mezlerneja instruisto de la nederlanda, la angla kaj la germana, Belgio

Ljudmila Novak, MEP, ĉefino de la partio "Nova Slovenia", Slovenio

Małgorzata Handlik, MEP, partio Platformo de Civitanoj, Pollando

Dr-o Seán Ó Riain, aŭtoro "Lingvoplanado en Irlando kaj Kebekio" (Foras na Gaeilge, 1994), Irlando

Jozef Reinart, Vicĉefo de Misio, Ambasadato de Slovakio al Belgio kaj Luksemburgio, Slovakio

Flory Witdoeck, entreprenisto, Oostende, Belgio

Michael Cwik, ekonomiisto, iama oficisto de la Eŭropa Komisiono, Belgio